

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO

Redakcia Oficejo, 37, Brussel (Belg.)

Ejo * Breughel *

Flandra Esperantista Grupo

N.R.L.M.* (Nia Katala Asocio)

Officieel Orgaan

van den

Vlaamschen
Esperantisten -
Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.
Postchek: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

AFDEELINGEN:

Aalst: « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat, 30.
Aarschot: « La Progreso ». Sekretariaat: Fabriekstraat, 28.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Stefaniestraat, 44.
Anzegem: « La Juna Espero ». Sekretariaat: Statiestraat, 38.
Arendonk: « La Verda Kampina Stelo ». Sekretariaat: Schotelven, 4.
Blankenberge: « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.
Brugge: « Paco kaj Justeco ». Sekretariaat: Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.
Deinze: « Deinza Esperanto-Klubo » (D.E.K.). Sekretariaat: Dorp, 54, Astene.
Diksmuide: « Grupo Zamenhof », Sekretariaat: Maria Doolaeghestraat, 36.
Gent: « Roeland ». Sekretariaat: Rasphuisstraat, 5.
Kortemark: « Eta semo povas kreski ». Sekretariaat: Statiestraat, 23.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.
Lebbeke: « Vasta Horizonte ». Sekretariaat: Stationstraat, 87.
Leuven: « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Broekstraat, 21, Heverlee.
Lichtervelde: « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Stw. op Torhout, 150.
Oudenaarde: « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Esperantista Grupo ». Sekr.: Hoogledesteeweg, 163-165.
Tienen: « Zamenhofa Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumplich.
Torhout: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Boomgaardstraat, 4.
Vichte: « La Frateco ». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.
Vilvoorde: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.
Wervik: « Fratiĝo ». Sekretariaat: Brugstraat, 9.
Wevelgem: « Per Esperanto al Mondpaco ». Sekr.: Papenstraat, 54.
Woumen: « Veni, Vidi, Venki » (V.V.V.). Sekretariaat: (Rom, Vandepoele).
Zaventem: « Verda Standardo ». Sekretariaat: Heldenplaats, 115.
Zwevegem: « Paco per Esperanto ». Sekretariaat: Ootegemstraat, 71.

VERTEGENWOORDIGERS:

Assche (Brab.): L. De Rop, Tenberg, 24.
Deerlijk: Fr. Benoit, Kapellestraat, 7.
Dendermonde: Fino Z. Ghyselinckx, Van Duysestraat, 24.
Hamme (Vl.): G. Lenaers, Willemstraat, 22.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mol: L. Claeys, Kapellestraat, 3.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: G. De Boes, Wijnstraat, 81.
Sint-Truiden: G. Mathijs, Steenweg op Hasselt, 55.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas:

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA !

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:

A. Pittoors
Ten Eeckhovelei, 125
Deurne-Noord
Antwerpen



Administranto:


Adolf De Keyzer
P. van Humbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.



La Nekonata Soldato

El « La Pirato », majo 1934.

Tie li kuŝas — modesta la tombo,
Kiel konvenas al lia agad'.
Li ja laboris sen ia aplombo',
En milradaro sin sentis nur rad'.

Li estis membro de l'universala,
Ankaŭ, sendube, de l' fak-asoci';
Krome leganto de l'oficiala.
Kaj de aliaj gazetoj dek-tri.

Altajn postenojn li ne ambiciis,
Sed ĉiam pretis, se estis bezon' :
Kiam ajn io nebone funkciis,
Tuj li sin metis je plena dispoŝn'.

Librojn aĉetis li tre diligente,
Varbofoliojn disdonis laŭ pov',
Ĉiam mallaŭte, senbrue, silente;
Kaj ja ne vana montriĝis la prov'.

Stelon li ĉiam elmontris fiere,
Frontis demandojn per scia

[kviet',

Mokojn aŭskultis indulge, tolere,
Venkis per sia trankvila ridef'.

Tamen ne kreu lin homo

[havriĉa !

Etis nur lia enspezocifer' ;

Sed li sin sentis plej multe feliĉa
Sin oferante por granda l'Afer !

Ĉiam regule li pagis kotizon,
Grupajn kunvenojn vizitis sen

[mank'

Eĉ ekstervice grupkason la ftizon
Helpis kuraci sen celo je dank'.

Tiel li agis, oferis kaj varbis :

La nekonata kaj simpla soldat'.

Lian rikolton aliaj surgarbis,

Dum lin kaperis la Granda

[Pirat'.

Tiel li vivis, kaj tiel li mortis.

Nun li jam kuŝas en eta ter-spac'.

Eĉ la gazetoj pri li ne raportis...

Sed tutegale ! Li dormu en pac'.

Esperanto in de Praktijk.

ARGENTINIE

Het veelgelezen weekblad «Pan», aan vulgarisatie der wetenschap gewijd, heeft een regelmatige Esperanto-rubriek ingevoerd, onder leiding van «Argentina Esperanto-Kolegio». Adres van de redactie: Rivadavia 1382, Buenos Aires.

BELGIE

In haar zondagnummer begon het kommunistisch dagblad «La Voix du Peuple» de regelmatige publicatie van een Esperanto-hoekje.

FRANKRIJK

De internationale tentoonstelling van Parijs 1937 liet een brochure in de wereldhulptaal verschijnen. Verlucht met talrijke illustraties en met plattegronden der tentoonstelling zal zij vele diensten bewijzen aan de bezoekers-Esperantisten. Deze propaganda-brochure zal naar 60 landen worden gestuurd.

IERLAND

De radio-stations van Dublin, Athlone en Cork begonnen uitzendingen in de internationale taal.

KATALONIE

De Katalaansche regeering liet zich door drie afgevaardigden officieel vertegenwoordigen op de konferentie: «Esperanto in het Moderne Leven», welke te Parijs gehouden werd en waaraan 600 vertegenwoordigers van 22 landen deelnamen.

LITHAUEN

De «Asocio por libérigo de Vilnius» (Vereeniging voor de bevrijding van Vilnius) in Kaunas gaf een brochure uit «Nia Batalo» («Onze Strijd»). Meer dan 5.000 brieven werden hierdoor ontvangen uit alle landen der wereld. De regeering van Lithauen, getroffen door de belangstelling der Esperantisten, liet zich op de Konferentie «Esperanto in het Moderne Leven» te Parijs vertegenwoordigen en besloot tot de uitgave eener brochure over Lithauen in Esperanto.

NEDERLAND

De directeur-generaal der Nederlandsche P.T.T. heeft besloten Esperantisten-postbedienden in dienst te stellen ter gelegenheid van de Jamboree. Talrijke scouts in alle landen der wereld hebben Esperanto geleerd met het oog op deze groote internationale bijeenkomst.

OOSTENRIJK

Het ministerie voor handel en verkeer heeft een nieuw gidsboekje uitgegeven in Esperanto. Gratis verkrijgbaar bij: Osterreichische Verkehrswerbung, Nibelungengasse 4, WIEN VII.

VEREENIGDE STATEN

Te New-York wordt Esperanto onderwezen in zes scholen en colleges. Een Esperanto-vereeniging voor studenten werd opgericht.

3. ESPERANTO EN LA LERNEJON.

Kelkaj parlamentanoj demetis leĝprojekton en la parlamento. Ĝi ne multe efikos ĉar en nia lando la spiritoj jam ne estas pretaj. Ni do unue devas pretigi ilin.

Tiu prepara laboro entenas; la ĝeneralan propagandon, ĝi estas la laboro de la tuta Esperanto-movado; ĝi ankaŭ entenas la specialan propagandon ĉe la ĝeinstruistoj, kaj la metoda agado ĉe ĉiuj personoj kiuj estas influhavantaj en lernejoj aferoj.

La 2 lastaj punktoj estas speciale kaj ĉefe la laboro de le federacio.

4. PROPAGANDI KAJ PLIFACILIGI LA ALIGON AL LA INTERNACIA ORGANIZO.

La tutmonda asocio de ĝeinstruistoj (TAGE) eldonas la Internacian Pedagogian Revuon (IPR) en kiu ĝi precipe pristudas la situacion de la instruo en la diversaj landoj, kaj propagandas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

La ĝeinstruistoj ne sufiĉe konas la gravecon de tiu asocio, kaj multaj ne aliĝas.

Por unuopulo la kotizo estas sufiĉe alta, sed, formante sekcion oni povas grupe aliĝi, tiel la kotizo senteble malplialtiĝas.

LABORMANIERO.

Estas la ekstera, aŭ propagando laboro, kaj la interna aŭ organiza laboro. La propagandan laboron mi jam priŝtraktis, parolante pri la celoj. Pri la organiza laboro, provizora komitato fiksu la necesajn regulojn.

R.

Paradokso pri Esperanto

Verkis FREDERIKO KARINTHY.

Samideano,

Kara amiko, ne diskutu kun mi kaj ne argumentadu, ne frapadu miajn pordegojn malfermitajn, ne klopodu min konvinki, — estas tute superflue. Mi estas konvinkita kaj — nun mi sufloras al vi la grandan sekreton — ĉiu estas konvinkita. Kaj tamen do, kiel povas esti, demandas vi naive, ke ankoraŭ estas homoj, kiuj...

Ne daŭrigu. Mia respondo ankaŭ je tio estas la sama, Guste pro tio. Strange, ĉu ne? Sed tiel estas.

Ke Esperanto estas bona, ĝusta kaj grandioza afero, ke ĝi estas la sola, certa ebleco kaj maniero por solvi la Babel-problemon de la mondo; tio estas tute klara, perfekta, nerefutebla vereco. Kaj mi diras al vi, ke tiu ĉi nerefutebleco kaj perfekteco estis ĝis nun la ununura malhelpaĵo, pro kiu Esperanto je sia kvindekjara ekaperdat-reveno ne havas tiun pozicion, kiun ĝi meritis: ke en ĉiuj lernejoj de la mondo oni instruu ĝin, ke ĉiu homo scianta skribi kaj legi konu ankaŭ Esperanton, ke ĝi estu tiel natura ilo de la internacia interkomunikigo, kiel tia la fervojo, telegrafo aŭ la poŝto estas.

Vi kredas nun, ke mi troigas la paradokson. Vi eraras. La mondon, komprenu finfine, ne ekkono kaj komprenemo, sed vanteco kaj fantazio direktas. Rimarku finfine, ke la homoj ne ŝatas la perfektajn, nerefuteblajn verecojn. La homoj ŝatas diskuti, kontraŭargumentojn fari, ĉar vanteco kaj fantazio bezonas batalon kaj venkon, ĉar la vanteco kaj fantazio konsideras la konvinkitecon venkiteco, — la vantecan ĉagrenas kaj incitas kaj tedas la nerefutebla

TRAFA PROPAGANDILO
estas jarkolekto de
LITERATURA MONDO

LINGVO-LIBRO

informas vin pri ĉiu okazo
en nia literaturo. Abonu
ĝin kune kun viaj amikoj.
Abonprezo (tri ekz. kune)
8 fr.

Abonojn akceptas kaj spe-
cimenojn sendas :

Flandr. Esperanto-Instituto

Magdalenast., 29, Kortrijk (p.k. 326861)



*En august' kongresmonato,
Renkontiĝo kun ĉiokonate,
Konatiĝo, ĉiesterlande,
Ĝin plezuro vere granda.
Ĝed se vi kun pli festas,
Ne forgesu dum ĝojlibro,
Ke plezur' pli granda estas
Konatiĝ' kun la Mo-libro.*

vereco, je kiu ĝi sen interdisputado kaj diskuto diri devas: tio estas ja tiel, kaj ne aliel.

Tro evidenta kaj memkomprenebla estas la neceseco de Esperanto, — tio estas la malbonaĵo. Ĝi ne devus esti tiel memkomprenebla kaj evidenta por ke ĝi faru sian efektivan kaj merititan sukceson. Kaj kiu, kiel ni ambaŭ, tutkore deziras tiun sukceson, lasante la ĝisnunan politikon de konvinkigo kaj akceptigo, ni devas transpreni la taktikon de tiu alia politiko, kiun hodiaŭtage la homanimo pli bone konanta kulto de reklamo kaj modiniciato reprezentas; prefere forgesi ĝian necesecon, ol akcenti. Vidu, vi tuj komprenos min. La kravato, ĉu ne, ne estas tiel necesa kaj utila kaj grandioza kiel Esperanto, — tamen, minimume milionfoje tiom da homoj portadas kravaton ol kiom esperante parolas, spite de tio, ke la eklerno de ĝusta nukoligo de la kravato bezonas tiom da tempo kiom la lernado de Esperanto. Ĉar la kravato laŭmodiĝis, — ĝi laŭmodiĝis ne pro ĝia merito kaj komprenemo de homoj, sed pro vaneco kaj imago, — ĉar per klarigo kaj komprenigo vi povas opeope ĉiun konvinki, — sed la amason ĉiam la modo direktas-is-os.

Ne tion proklamu, samideano, ke Esperanto estas bonaĵo, — tion proklamu, ke ĝi estas laŭmoda. Ne pri tio parolu al tiu, tra kiu vi propagandi ĝin deziras, ke li estu esperantisto, sed pri tio ke, aliaj jam fariĝis tiaj. Ne per tio fanfaronu, ke saĝaj homoj kaj grandaj intelektuloj kaj seriozaj kaj famaj homoj adeptiĝis al ĝi. Prisilentu, ke Anatole France kaj Tolstoj estis esperantistoj, sed diru prefere, ke oni povas de Max Schmeeling kaj Joe Louis k.t.p. nur esperante peti subskribon — kaj mi vetas kun vi, ke dum duonjaro Schmeeling kaj Louis estos devigataj eklerni Esperanton de tiuj, kiuj pro tio eklernis Esperanton ĉar ili kredis, ke tiuj scias ĝin kaj pro tio ankaŭ ili ĝin scii devas.

Tiel estas tio, mia sammodano.

Trad. el la hungara *Strober Ferenc*.

(el « SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN »)

21

E.N.E.L.E. (Nia Esperanta Esperanto)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Rue Jacquemains, 37, Brussel (Belg.)

La Turkonstruanto

El la dramo « La Infanoj de Semini »

3a sceno — 4a akto

de

R. VERHULST

Ludas en la 12a jarcento, ĵus post kiam. Godfredo de Bouillon entreprenis la unuan krucmilitiron kaj dum en Antverpeno regis ĝenerala maldisciplino. La Antverpenanoj estis ankoraŭ la infanoj de la maldeca idolo « Semini » kaj la aŭtoro prezentas ilin kontraste kun la « turkonstruantoj » kiuj ne nur konstruis la belan ĉefpregejan turon, sed kiuj suprenlevis Antverpenon al ĝia apogeo en la 16a jarcento, kiam ĝi estis metropolo de komerco kaj arto.

... ..

La turkonstruanto ĉe Barono Gunther, kiu aspiras la limmarkizan kronon de Antverpeno

TURKONSTRUANTO

Jen estas mi, Sinjor'.

GUNTHER

Amiko, kion

Deziras vi, aŭ povas fari mi

Por vi ?

TURKONSTRUANTO

Sinjoro, mi ekhelpos vin.

GUNTHER

Min helpi ! Vere mi bezonas helpon.

TURKONSTRUANTO

Popolon fari estas via revo.

GUNTHER

Jes.

TURKONSTRUANTO

Ĝi estas ankaŭ nun la mia.

GUNTHER

Cu vi agema estas ?

TURKONSTRUANTO

Jes, Sinjoro.

GUNTHER

Bezonas tian viron mi. Parolu.

TURKONSTRUANTO

Senforma mas' ja estas la popolo.

Per ĉi argilo, kiu modlos bildon,

Kaj tiam ekanimos la giganton ?

Vi portas glavon, kiu hakos, skulptos

La bildon. Sentas tiel forte mi

Inspiron, ke mi mem animi povas.

Mi prilaboros krudan ŝtonon, ĝin

Vivigos, suprenigos en gracio.

Festonoj delikataj ekburĝonos

El trunk'giganta, elvolviĝos volbe,
Kaj vidu! L'mas' leviĝas kaj ekfloras;
Floradas. Ho, printemp' de ŝtonaj rozoj!
Popol' komprenos tion, mem altiĝos
Pro poezio, fort', juneco, ĝojo,
Pro memkonscio sen aroganteco.
Kaj bel', nobleco brilos sur vizaĝo
De la popol' ; ĝi supren ekrigardos
Kaj Dia lum' briligos ĝian frunton.
Kaj kiam mia turo kantos kanton
De Bel', de Kredo al la Idealo,
El la popola buŝ' resonos tiam
La kant' fiera, dolĉa, ja la himno!
Sinjor', ni estu turokonstruantoj!

GUNTHER

Mi dankas vin, amiko, sed revenu,
Nun al mi mankas temp' por kunkonstrui.
Tankelm' (1) min ĉro maltrankviligas.

TURKONSTRUANTO

Vere,
Gusttempe mi neniam venas. Tamen
La spaco super nia urb', Sinjoro,
Rigardu, kiel ĝi malplena estas!
Ateno havis Akropolon, vivis
Animo tie en la temploj, bildoj.
El ŝton' levigos mi kristananimon,
En bel', sunlumo, en lazuro pura.
Kaj nia Pallas estu l'Virgulino!

GUNTHER

Sed ne hodiaŭ. Je alia fojo,
Kiam mi mastro estos.

Al la enveninta urbestro
Kara urbestro,

Vi konas tiun viron?

URBESTRO

Jes, Sinjoro.

GUNTHER

Poet' aŭ frenezul'?

URBESTRO

Aŭ ambaŭ, ĉar
Ĉu l'unu ja ne estas la alia!

GUNTHER

La sort' ne tre karesas min. Mi virojn
Bezonas kaj nur trovas revemulojn,
Kiel *Kornelo* (2) kaj nur frenezulojn
Kiu per turo volas savi ĉion.

El la flandra : TYNEVERUM.

(1) Herezulo, kiu tiutempe havis senliman potencón en Antverpeno.
(2) Ekleziulo, kiun Gunther uzas por realigi siajn planojn.

RATATO, LA HEROA!

de POL VAN DER POEL.

En tiu tempo kiam oni forstrekis la vorton « Malebla » el la vortaro, ankaŭ la ratoj havis sian lernejon.

Kompreneble estis rata lernejo, kaj ĝi estis organizata en larĝa, subtera tubo de la ŭrba malpura-akvokonduko. La ratoj ja estis viglaj, nervozaj bestoj kaj malfacile ili restis trankvilaj dum la klas-horoj. Eble jam dek fojoj tiun matenon la profesoro kriis : « Silenton mi petas ». Sed silenti ili vere ne povis.

— Se vi silentas, li tiam daŭrigis mistere, mi rakontos pri Ratato, la granda heroo de l' lasta milito, kies bildo vi rimarkas ĉe la muro.

Kaj kvazaŭ per magia bastono nun finiĝis la susurado ; ĉiuj la ratetoj kurbigis siajn vostetojn ĉirkaŭ la piedoj, kaj aŭskultis, tiel ke nun oni eĉ povas aŭdi la paŝeton de muso.

— Bone, reparolis la profesoro, pli alten ŝovante siajn okulvitrojn, kaj tiam li ekrakontis :

« La milito, miaj karaj ratetoj, estas la plej grandioza epoko, kiu estas imagebla ; la milito donas ne nur al la homoj, sed ankaŭ al ni ratoj, la okazon, montri la plej heroan kuraĝon, la plej altajn virtojn. Kaj, kio estas ĉefa, ĝi donas pli da libereco, pli da prospero, pli da mangaĵoj. Eble ke ĉiuj homoj ne pravas miajn parolojn, sed kompreneble, ni vidas la aferojn el rata vidpunkto, ĉar, mi ne tro povas ripeti ĝin : la homoj fine estas niaj plej grandaj malamikoj.

Precipe en tiuj malbonaj pacotempoj, ili kvazaŭ nur pripensas rimedojn por mortigi nin kaj detruiri nian rason... sed kiam la glora suno de l' milito leviĝas ĉe ruĝa, sanga horizonto, tiam miaj karaj ratetoj, ili nur pripensas rimedojn por mortigi sian propran rason, kaj lasas al ni pli da libereco, pli da paco. La milito de l' homo alportas la pacon al la ratoj... La pano de l'unu estas la morto de l' alia... Ja, estas eterna vero, ĉu ne ?

Aŭskultu bone, ĉar sendube en via vivo, vi revidos tiun belan tempon. Sajnas, ke la homoj, kvankam mi ne tre bone komprenas tion, efektive bezonas freŝan militon de temp' al tempo... Do, se baldaŭ vi aŭdos krakadon teruran, tondron milopan, ne timu... Estas la daŭra venka bruo de l' granda festo... Ĉar tiu tondro forpelas la homojn kiel birdojn, kaj tiam neniu malpermesas la raton iri kaj riĉiĝi, eĉ en la palaco de l' reĝo, ĉar ankaŭ reĝoj timas tiun tondron. Sed, kia aventuro, se la milito daŭras, longe daŭras... Vi travivos la plej gloran romanon, kiu povas esti elpensita.

Rigardu la bildon de tiu nobla Ratato...

Kiam la milito alvenis ĝi nur estis nekonata, malriĉa rateto kiel vi ĉiuj... Kaj kio faris ĝian malriĉan vivon pli danĝera, pli dolora estis la fakto, ke ĝi loĝis sub la planko de grenmagazeno...

— Ho ! Ho ! Ho ! kriis la ratetoj gaje.

« Jes, jes, daŭrigis la griza profesoro, vi ĵus pruvas kiel nekonsciaj estas la infanoj... Ili ne vidas la danĝeron. La riĉaĵo estis sub

la okuloj de Ratato kaj de ĝiaj familianoj, sed... sed, nur laŭ mal-larĝa truo ili povis eniri la « Trezorejon »... Kaj en tiu trezorejo konstante estis gvardio : la terura virkato Kiĉo, pri kies aventuroj mi jam la antaŭan fojon rakontis... Kiĉo estis nigra kiel la nokto, kaj la elektraĵn lumojn de siaj grandaj okuloj ĝi kovris per la okulko-vriloj, kaj nur per malgrandaj retoj ĝi vidis ĉion... Jam tri frati-noj kaj unu frato de Ratato estis mortigitaj de ĝi, kiam ili intencis preni la plej elementajn nutraĵojn, la ĉiutagan panon.

Ratato restis sola kiam ekbruis la granda, liberiga krakado, la feliĉa milito ! Pluvis bomboj kaj grenadoj... La magazenaĵoj muroj kiel paperaj folioj, vitroj rompiĝis, pulvo kaj cindro plenigis la aeron. Ratato tuj forkuris laŭ subtera koridoro al kelo, kaj trankvile atendis ĝis kiam la tondrado finiĝis...

Malfacile li rekonis la vojojn, sed kion li aŭdis ?..

... « Mi-aŭ... mi-aŭ... mi-aŭ !... »

Estis la voĉo de l' kruela Kiĉo, sed tiel tima, tiel petega, ke Ratato, kiu havis bonan koron, preskaŭ kompatis, tiel dolora estis la plendo. Sed tuj la sankta malamo levigis en ĝia koro... Ah ! Ah ! la mortiganto de liaj gefratoj suferis... Li ĝojis, jes li ĝojis, kaj kurage, kvankam prudente li antaŭeniris por vidi kio okazis... Tra fendo inter la disrompitaj ŝtonoj kaj lignaĵoj li vidis Kiĉo enkarcerigita...

Kia feliĉo !... La virkato estis kondamnita je morto pro malsato kaj mizero, kaj triumfe Ratato eniris la Trezorejon, kiu, sub la detruita domo de li estis akirebla laŭ cent mallarĝaj koridoroj.

Ratato ne povis kredi siajn proprajn orelojn. Kia riĉeco ! Plenaj sakoj da tritiko, sekalo, rizo, maizo; grandaj skatoloj da vermicelo, paketoj da makaronio... Estis la ĉielo sur tero !

Duonplatigita sub pezaj ŝtonoj la perfida virkato ĉiam miaŭis, miaŭis, kaj eĉ, kvankam ĝi suferis, ĝiaj verdaj okuloj brilis de mortigdeziro kiam ĝi rimarkis la raton. Sed tiu lasta ridis kaj dancis antaŭ la monstro, kaj montris ŝerce sian langon...

Pro granda emocio Ratato preskaŭ forgesis nutri la bonajn manĝaĵojn. Kun volupta paŝo ĝi kuris tra la riĉeco, kaj nur tiu sentado : ĉion ĉi havi sub la piedo, ĝin kvazaŭ ebriigis pro feliĉo.

Tiam Ratato subite pripensis la mizeron de l' rata raso dum la malgrasa pacotempo... Ci-tie estis sufiĉe por ĉiuj la ratoj de l' ĉir-kaŭaĵo, ĝi ekkriis. Kion mi sole farus per tiom da nutraĵo.

Dum tuta horo ĝi manĝis de la dek diversaj bonaĵoj, kaj kiam ĝia ventro riskis eksplodi, ĝi forlasis la trezorejon, ankaŭ mokis pri la jam mortanta Kiĉo, kaj vizitis siajn najbarojn. Kiel pajlo-fajro la novaĵo de l' malkovro disflugis en la rataj rondoj. El ĉiuj truoj, keloj, defluiloj, riveretoj ili rapidis al la abundo de Ratato, kies nomo nun estis sur ĉies lipoj. Vivu Ratato !, oni kriis la savinto de nia raso ! La vojoj al la Trezorejo estis nigraj pro la rataj procesioj... La homoj estis for.

Ni ratoj ĝuis liberecon. Ni estis riĉaj, gajaj; ni povis festi dum tagoj. Tamen nenio sur la mondo estas perfekta. Jam la duan tagon revenis multaj da homoj en strangaj uniformoj : tiuj estis la fabri-kantoj de l' granda tondro, de ĉiuspecaj krakadoj kaj pafiladoj.

Ratato kun kelkaj el siaj amikoj restis en la detruita domo. Jam multo da nutraĵo estis forportata de la centoj da kamaradoj. La

kruela Kiĉo estis morta kaj kun freneza volupto ili manĝis la katan viandon. Pli dolĉa venĝo ne estis ebla.

La homa tondrado rekomenciĝis preskaŭ ĉiun tagon; sed la strange vestitaj viroj, kiuj sin nomis soldatoj, ne foriris malgraŭ la bruo, kaj kiel mi jam diris ili mem ankaŭ fabrikis bruon. Sajnas ke laŭ ilia naturo ili tre ŝatas mortigi unu la alian. Por bone fari tion, ili ekfosis grandajn zigzagajn putojn kiujn ili nomis «tranĉeoj». Kaj kio neniam antaŭe okazis ili ekvivis kiel ni, ratoj, en ŝlimo kaj eskremento. Kompreneble tie ne estis ŝrankoj, kaj Ratato kaj ĝiaj amikoj tuj eniris la tranĉeojn kaj malkovris panon, viandon, fromaĝon, kukojn kaj aliajn dolĉaĵojn... Ho! Estis amuza tiel inciti la malamikajn homojn. Ili blasfemis pro kolero, ili pafis per siaj revolveroj. Sed niaj amikoj estis pli rapidaj ol iliaj kugloj!

Dum tiu feliĉa milita tempo ju pli la homoj malgrasiĝis pro malsato kaj mizero, despli la ratoj pligrasiĝis pro la abundeco de viando... de homa viando!... Ho! Nun mi jam denove forgesis tiun guston. Sed tiam niaj malamikoj la homoj estis tiel ĝentilaj por ni, ke ĉiun tagon ni havis freŝe buĉitan homviandon. Dolĉaĵo ne imagebla.

Ratato dum ĉiuj tiuj okanzintaĵoj feliĉaj, precipe ŝatis la aventurojn... Amuzaj aventuroj per kiuj ĝi montris sian kuraĝon neordinaran. La soldatoj, kiuj rimarkis ke niaj amikoj ŝtele forprenis ĉion manĝeblan, tuj eltrovis novajon por savi siajn nutraĵojn, kaj per ŝnuroj ili pendigis ĉion ĉe la plafono de l' rifuĝejoj. Sed Ratato tiam klopodis glitigi laŭ la kordo kaj fine akiris la belan frukton de ĝia klopodo.

Ĝiaj kamaradoj tre miris pri la granda kapableco de l' jam fama Ratato, kaj okazis eĉ ke soldatoj, kiuj eble jam havis sufiĉe da malamikoj, kaj nun, iom malpli malamamis la bestojn, ke soldatoj, mi diras, ridis pri kaj admiris la veran atletan arton de l' «granda» rato.

La lasta ago de Ratato, kiu eternigis ĝian nomon, estis preskaŭ nekredebla.

Soldato ĵus estis ricevinte de amikino paketon da biskvitoj, kaj per tre maldika kordeto li ankaŭ pendigis la biskviton ĉe la plafono de l' tranĉerifuĝejo.

— Ne estas facila havi tion, diris Ratato al siaj kamaradoj. Sed ni klopodos...

Flanke de tio ankaŭ pendis panon de alia soldato, kaj sekve de lerta ekzercado, Ratato, kiu jam bone povis surkuri muron, sukcesis atingi tiun unuan ŝnuron, kiu estis pli dika kaj pro tio ankaŭ pli facile atingebla. Sed ĝi ne ŝatis la panon, sed la biskviton de la alia.

Kion ĝi faris nun?

Kiel vera cirka akrobato, Ratato ekbalancigis la panon, kiu nun similis al horloĝa balancilo. La kamaradoj kun granda miro alkuraĝigis lin... Pli kaj pli ĝi alproksimiĝis la celon... La pano svingiĝis energie kaj Ratato je bona momento saltis per «looping-the-loop» tra la aero, kaj vere flugis sur la biskviton... Ververe, ĝi ŝvitis... Sed kia bonega trofeo!... Ĝia vosteto svingetis ekde ĝi tiel proksime jam flaris la dolĉaĵon...

Sed, ho ve ! Soldato subite aperis kun revolvero en la mano.

Pang !... Pang !... Ratato falis morta sur la planko de l' tranĉea rifuĝejo...

La kamaradoj timege forkuregis... Kaj baldaŭ dek horoj en la ĉirkaŭaĵo ĉiu sciis kiel Ratato mortis sur la honora kampo. Karaj ratetoj, ni ne forgesu ĝian memoron...

La profesoro forviŝis larmon de siaj okulvitroj... kaj en respekta silento la bando de ratetoj alrigardis ĉe la muro la portreton de Ratato, la heroo !

ESPERANTO-POSTZEGELS

In 1925 werd Esperanto voor het eerst aangewend op postzegels. Hier ligt een treffend bewijs van het practisch nut dat Esperanto biedt voor het internationaal postverkeer.

We geven hieronder de volledige lijst in volgorde met jaartal. De zegels worden bondig beschreven, de Esperanto-tekst weergegeven en vertaald.

In de lijst vindt ment eerst het rangnummer, waarde, kleur, tanding en watermerk.

BRAZILIE

1935 (Nov.). Ter gelegenheid van de 8ste jaarbeurs van Rio de Janeiro, werd een zegel uitgegeven met Portugeesch-Esperanto-tekst. De zegel draagt in 't midden een schild met kroon; daarboven het jaartal 1935. Links Portugeesche tekst, rechts volgende Esperanto-tekst: « Oka internacia specimena foiro-Rio de Janeiro-Brazilo ». (Achtste internationale monsterjaarbeurs-R.d.j.-Brazilië).

1 200 Reis, Blauw.

1936 (Nov.). Zelfde zegel als hierboven, met de melding « 9de internationale monsterjaarbeurs en jaartal 1936. Verder, ter gelegenheid van het 9de Braziliaansch Esperanto-kongres in Rio de Janeiro, werd een zegel uitgegeven met Esperanto-tekst. — De zegel doet ons een groene ster zien, omgeven van de vlaggen der wereldstaten. Rondom de vlaggen de woorden (uitsluitend in Esperanto): « Naŭa Brazila Kongreso de Esperanto. Nov. 1936. Rio de Janeiro » (9de Braziliaansch Kongres van Esperanto. Nov. 1936. Rio de Janeiro).

2. 200 Reis, Rood.

3. 300 Reis, Groen.

SOVIET-RUSLAND

1925 (Okt.). Gelegenheidszegel uitgegeven ter eere van Popov. De zegel verbeeldt het portret van Popov, omgeven door 2 pylonen, verbonden door uitzenddraden, en draagt volgende Esperanto-tekst: « Inventisto de Radio, Popov, uitvinder der draadlooze ».

1 7 Kopek, blauw-groen, tanding 13 1/2, watermerk C (zie Yvert & Tellier).

2 14 Kopek, donker-groen.

1926 (Juli). Gelegenheidszegel, uitgegeven bij het 6de Esperanto-Kongres te Leningrad. Men ziet op den zegel een obelisk die haar punt eindigt in de letters SAT (afkorting van Sennacia Asocio Tutmonda), langs elke zijde bevindt zich een ster. Dit alles is omgeven door een ovalen band, waarop in Morse-teekens volgend te lezen staat in Russisch en Esperanto: « Werkers van de Wereld, verenigt U ». Op den onderkant van den zegel kan men lezen: « VIde internacia proletara - Esperanto-Kongres 1926 » (6de Intern. Esperanto-Kongres van Proletariërs. 1926).

3 7 Kopek, groen en rood, getand 11 1/2, watermerk C.

4 14 Kopek, groen en violet.

1927 (Sept.) Bij de 40ste verjaring van het ontstaan van Esperanto, werd een Zamenhof-zegel uitgegeven: men ziet zijn beeltenis, waaronder men leest: « Aŭtoro de Esperanto — Dro Zamenhof ». Langs de linkerkant ziet men een groote groene ster, die zich boven fabrieken afteekent, terwijl een reuzenkraan de cijfers XL ophaalt. Het motto: « ESPERANTO » beheerscht geheel den zegel.

- 5 14 Kopek, groen-geel en bruin, tanding 10 1/2, met waterm. C.
5a Zelfde zegel, zonder watermerk C.

1927. De twee zegels van 7 kopek, n^{rs} 1 en 3 werden bij tariefverhoging overdrukt met 8 kopeks.

- 6 8 op 7 Kopeks overdrukt rood (n^r 1).
7 8 op 7 Kopeks overdrukt zwart (n^r 3).

1930. Verschijning van 2 gewone postzegels. De eerste stelt het Centraal telegraafgebouw van Moskou voor met Esperanto-tekst: « Centra Telegrafo. Moskvo ». De andere verbeeldt het Hydro-electrisch krachtstation « Lenin », aan de Volkov-rivier. De Esperanto-tekst luidt: « Volkov, H.E.S. (Hydro-Elektra Stacio) je la nomo de Lenin ».

- 8 1 roebel, blauw-schalie, getand 10 1/2, watermerk A (Centr. Telegraafkant.).
8a 1 roebel, blauw-schalie, getand 12, watermerk C (Centr. Telegraafkant.).
9 3 roebel, groen-geel en bruin, getand 12, watermerk C (afdamming).

E. PAESMANS.

Diversaĵoj

NOVAJ SEKCIOJ DE F.L.E. FONDIGIS en Deinze kaj Kortemark. Ni bonvensalutas « Deinza Esperanto-Klubo » (D.E.K.) kaj « Eta Semo povas kreski » en nia konstante grandiganta verda familio !

* * *

NIA LIGANO Jan van As el Antwerpen partoprenis en la Esperanto-konkurso organizita de la Fremdultrafika Asocio de la norvega ĉefurbo Oslo. Li sukcesis forkapti la 8-an premion. Ni gratulas !

* * *

KURSGVIDANTOJ atentu ! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VIII. Maria-u 34.

Vi deziras interesan, amuzan kaj instruon gazeton ? Jen la plej malmultekosta revuo pri arto, scienco kaj amuzo. « VERDA REVUO ». Riĉe ilustrita, simple skribita. Tutjara abono 4,20 aŭstr. ŝilingoj. Wien VII. Hermans 31/36 Austrujo.

Nekrologo

En Antverpeno tute neatendite mortis JOHN THERY, membro de Flandrema Grupo Esperantista, kiu perdas en li amikon ĉiam helpopreta. Li ripozu pace.

* * *

Kruela sortobato trafis nian membron F. KENNES. Senkompatate la morto forprenis de li lian 5 jaran fileton.

Flandrema Grupo Esperantisto prezentas al la funebrantaj gepatroj siajn korajn kondolencojn.

* * *

Ankaŭ en Handzame la morto forrabis al la grupo Man' en Mano unu el ĝiaj fidelaj amikoj Victor SLEMBROUCK. Sincerajn kondolencojn.

Por nia liga flago :

Sekcio: F.L.E. « La Verda Kampina Stelo », Arendonk 26,25 fr.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

Vilém Werner : HOMOJ SUR FLOSGLACIO. *Komedio en tri aktoj (112 paĝoj, formato 14,5 20 cm.). Tradukis kaj eldonis: Moraviaj (Esperanto-Pioniroj. Olomouc. Prezo 12 Kx. — La Moraviaj Esperanto-Pioniroj kiuj havigis jam plurajn interesajn verkojn al la esperantistaro, denove meritas nian dankon pro la traduko de « Lidé na kre », la ĉefverko de Werner kiu kreita antaŭ unu jaro nun venke marŝas de scenejo al scenejo.*

La teatraĵo prezentas la akran lukton por la pano en la kriza nuntempo, la fiaskon de honesteco kaj moraleco kaj la venkon de ĉio malnobla en la nuna epoko de socia fistato. Junek, la mezlerneja profesoro « starante sur kruroj dismetitaj en du jarcentoj », vane kontraŭstaras siajn infanojn kiuj, post plurjara kaj malmoraliga senlaboreco, avide kaptas la okazon akiri pozicion en la vivo pagante plejofte altan moralan tributon. Geĉjo, la plej juna filo, iĝas kontoristo en granda bierfarejo, tion li dankas al sia piedpilkklubo kaj neniel al siaj kontoristaj kapabloj. Zdenko, la plej aĝa filo, kiel senofica tridekjara inĝeniero, morale ekbankrotiĝos kiam li trovas okupon dank'al sia plej juna fratino kiu ambicias ĉefrolon en filmo kaj pro tio vivas malmorale i.a. kun la potenca akciulo kaj filmproduktanto Bruckmann. Paŭlino, la plej aĝa filino, apenaŭ perlaboris sian vivon kiel doktorino en kliniko; ŝi edzinigas al doktoro kaj ili ambaŭ trovos bonstaton praktikante kiel « akuŝistoj » kaj mortigante la vivon je la kerno... Jen por la enhavo de tiu realisme amara akuzo.

La traduko estas prizorgita, la lingvo bona, la stilo flua kaj la ritmo vigla kiel konvenas al tia dialoga verko. Rimarkindaj esprimoj: (de mateno ĝis vespero) frapi en Remington-maŝinon, silentaĉu!, hove! (ho ve!). Neologismoj: (aŭtomobil) — hupo, rakit — (malsano), futbalo, uzino, disponento, iksodo, ĵerzo, kremaciejo, sordino; kelkaj sendube estas defendeblaj, ni tamen ŝatus trovi la klarigojn de la neologismoj, almenaŭ de tiuj kiuj pro nesufiĉa internacieco estas malfacile kompreneblaj. La preso kaj papero estas bonaj kaj preseraroj maloftegaj.

Amatoroj de « Happy-end »-romanoj flankenlasu « Homoj sur Flosglacio » sed kiuj interesiĝas pri la gravaj problemoj de l' vivo, nepre havigu al si tiun meditigan verkon kiun oni volonte relegas. E. C.

Kruela sortobato trafis nian membron F. KENNES. Senkompatela morto forprenis de li lian 5 jaran fileton.

Flandrema Grupo Esperantisto prezentas al la funebrantaj gepatroj siajn korajn kondolencojn.

* * *

Ankaŭ en Handzame la morto forrabis al la grupo Man' en Manou el ĝiaj fidelaj amikoj Victor SLEMBROUCK. Sincerajn kondolencojn.

Por nia liga flago :

Sekcio: F.L.E. « La Verda Kampina Stelo », Arendonk 26,25 fr.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

Vilém Werner : HOMOJ SUR FLOSGLACIO. *Komedio en tri aktoj (112 paĝoj, formato 14,5 20 cm.). Tradukis kaj eldonis: Moraviaj (Esperanto-Pioniroj. Olomouc. Prezo 12 Kx. — La Moraviaj Esperanto-Pioniroj kiuj havigis jam plurajn interesajn verkojn al la esperantistaro, denove meritas nian dankon pro la traduko de « Lidé na kre », la ĉefverko de Werner kiu kreita antaŭ unu jaro nun venke marŝas de scenejo al scenejo.*

La teatraĵo prezentas la akran lukton por la pano en la kriza nuntempo, la fiaskon de honesteco kaj moraleco kaj la venkon de ĉio malnobla en la nuna epoko de socia fistato. Junek, la mezlerneja profesoro « starante sur kruroj dismetitaj en du jarcentoj », vane kontraŭstaras siajn infanojn kiuj, post plurjara kaj malmoraliga senlaboreco, avide kaptas la okazon akiri pozicion en la vivo pagante plejofte altan moralan tributon. Geĉjo, la plej juna filo, iĝas kontoristo en granda bierfarejo, tion li dankas al sia piedpilkklubo kaj neniel al siaj kontoristaj kapabloj. Zdenko, la plej aĝa filo, kiel senofica tridekjara inĝeniero, morale ekbankrotiĝos kiam li trovas ekupon dank'al sia plej juna fratino kiu ambicias ĉefrolon en filmo kaj pro tio vivas malmorale i.a. kun la potenca akciulo kaj filmproduktanto Bruckmann. Paŭlino, la plej aĝa filino, apenaŭ perlaboris sian vivon kiel doktorino en kliniko; ŝi edzinigas al doktoro kaj ili ambaŭ trovos bonstaton praktikante kiel « akuŝistoj » kaj mortigante la vivon je la kerno... Jen por la enhavo de tiu realisme amara akuzo.

La traduko estas prizorgita, la lingvo bona, la stilo flua kaj la ritmo vigla kiel konvenas al tia dialoga verko. Rimarkindaj esprimoj: (de mateno ĝis vespero) frapi en Remington-maŝinon, silentaĉu!, hove ! (ho ve!). Neologismoj: (aŭtomobil) — hupo, rakit — (malsano), futbalo, uzino, disponento, iksodo, ĵerzo, kremaciejo, sordino; kelkaj sendube estas defendeblaj, ni tamen ŝatus trovi la klarigojn de la neologismoj, almenaŭ de tiuj kiuj pro nesufiĉa internacieco estas malfacile kompreneblaj. La preso kaj papero estas bonaj kaj preseraroj maloftegaj.

Amatoroj de « Happy-end »-romanoj flankenlasu « Homoj sur Flosglacio » sed kiuj interesiĝas pri la gravaj problemoj de l' vivo, nepre havigu al si tiun meditigan verkon kiun oni volonte relegas. E. C.

SUR LA VERDA VOJO. — **KANTU KAJ KORESPONDU** de S. STUIT. *10 × 15, 24 paĝa. Prezo ne indikita. Eldonis Grupo Zamenhof Diksmuide Belgujo 1937.* La libreto enhavas 17 kantojn plejparte tradukitaj el flandra lingvo kaj al flandroj jam sufiĉe bone konataj. Ni citas nur Flandra Leono, Flandrolando, La Espero, k.t.p. Ankaŭ la nuntempa sukceskanto « Pluveretoj » (Regendropjes) ne mankas. Plie la libreto donas kelkajn konsilojn rilate la korespondadon. — Kiel komenci kaj fini leteron? Ofte malfacila demando por novulo; ĉi-tie la libreto donas la solvon. Ne nur al la novaj Esperantistoj enirante la esperantistan vivon, ankaŭ al la ne tro spertajn en la korespondado la libreto estas taŭga helpilo.

NOVA TAGIGO. — **MONATA BULTENO DE LA LOVENA GRUPO « NOVA TAGIGO ».** — *6 paĝa — hektografita. Eldonis Lode Cnops, Broekstraat 21, Heverlee. Unuopaj numeroj Fr. 1,50.* En sia junia numero, Nova Tagigo raportas, laŭ maniero de Schwartz, pri la lastokazinta flandra kongreso, faras kelkajn pripensojn pri la kongresfotografajo kaj citas kelkajn opiniojn pri la kongreso. Krome la bulteno enhavas kelkajn admonajn vortojn de nia Majstro, poemon kaj interesan rakonton. Interesuloj turnu sin al la supra adreso.

Grupa Vivo

ANTVERPENO. FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La 4-an. de Julio ni dekope vizitis la Esperantistan grupon en Mol kies membroj tiel multnombre ĉeestis nian regionan kunvenon. Ne nur amuza ekskurso estis, ĉar ni ja devis gajni la Mol — anoj por nia Ligo. La 14-an. okazis reelektado de parto de la estraro. Ĝi donis jenajn rezultojn: Vic-prezidantino Fino. Van der Mast, unua sekretario Sro. Van Gindertael, kasisto Sro. Van As.

Kelkaj el niaj membroj ĉeestis la interesan prelegon de Sro. Boffejon de la V.B.O. (Vereeniging voor Beschaafde Omgangstaal (pri la temo: Ĉiu Internacia Lingvo necesas ».

La parolado estis kompreneble ege interesa.

BRUGGE. « PACO KAJ JUSTECO ».

Jen fine kroniko pri nia grupa vivo. Regis multe da entuziasmo dum la Cseh kurso kaj tiu entuziasmo decidigis nin kunresti kaj starigi grupon. Regis malmulte da entuziasmo dum la sekva kurso, sed la grupo estis fondita. Regule ni kunvenas, tre regule. Estas kelkaj tre fervoraj elementoj ĉe ni, kaj tio donas multe da espero. Mirinda estas la solidareca gefrata sento en niaj rangoj. Kompreneble jam kelkaj forfalis ĉu devige ĉu libervole: Ni bedaŭras... kaj esperas revidi. Okazis jam paroladoj. Pri Zamenhof, kaj nun pri la religiaj militoj dum la dekseca jarcento. Venos aliaj pri origino de Brugge, ekleziaj situacioj dum mezaĝoj. Kaj diskutvespero pri interesaj problemoj ankaŭ okazos. La Somervesperaj promenadoj ne estas tiel multope sekvataj kiel la kunvenoj en salono. Ni jam faris ekskursojn. Unu al Wingene. Detala raporto eterne memoriĝos pri ĝi. Multan dankon ni ŝuldas al kamarado G. Gryp kiu montris la vidindaĵojn kaj ĉirkaŭaĵojn de Wingene, kaj kiu ebligis al

ni supreniri la turon. Alia ekskurso estis farata, malgraŭ la pluvego, kvinope. Ni multe ĝojis. La nuna tasko por ni ĉiuj: prepari al konkursoj kiuj baldaŭ okazos. Kaj interesiĝi al nia E. literaturo kiu nun ege bonfartas. Klopodoj por tiu celo estos farataj. Ni devas koni kaj legi niajn altvalorajn verkojn. Fina vorto: ni ĉiuj konsciuj ke ni laboras al idealo, ke ni staras en idealista movado. La E. mistiko ne jam sufiĉe enpenetris nian grupon.

RONSE. LA PACA STELO ».

Kvankam ni esperis kunveni la 7-an de Julio tridekon da gesamideanoj, nur 21 ĉeestis la kunvenon. Malgraŭ tio ni ne malkuraĝis kaj ni tute esperos revidi en la proksima kunveno almenaŭ la duoblon je la novjara monato !!

De nun ĉiuj al laboro por la sukcesigo de nia csehkurso. La propagando estos disvastigata en ĉiuj anguloj de la urbo per afiŝoj, flugfolioj, eble per parolado k.t.p. kaj de nun, ja nun, ni jam akceptas novajn elementojn por tiu grava kaj tre instrua kurso. Al vi por ricevi kion oni demandas... pardonu kion oni postulas: nome KVINDEK novajn elementojn.

La unuan de Augusto ni ekskursos piedirante kaj revenante vagonare al « Kluisberg ». Ciu kunportu absolute sian kantaron por disaŭdigi nian ampleksan repertuaron da kantoj.

Tre verŝajne ni ekskursos aŭtobuse al la maro. La interesuloj bonvolu enskribi kiel eble plej frue. Ĉiuj korespondaĵoj estos adresataj al « La Paca Stelo » Concordia, Statiestraat, Ronse.

VICHTE. LA FRATECO.

Dum la pasinta monato de junio, nia grupo travivis aktivan kaj viglan labortempon. La organizita finfesto (kurso S^o Sole) sukcesis tre bone malgraŭ la malsukceso de kelkaj detalaj punktoj, kiel la mikrofono kiu malfunkcias. La ĉeesto de pli ol cent geesperantistoj el la regiono (el Kortrejko sole grupo de 36 anoj kun la flago) fariĝis brila demonstracio por Esperanto. — Multope ankaŭ ni biciklis al la finfesto de la kurso de S^o Niko Degraan, en Wevelgem. — La 20-an la grupo ekskursis, sub la gvido de nia membro, S^o Bekaert Gerard, al Astene, por viziti la muzeon de la fama pentristo Emiel Claus. Tre interesa kaj lerniga ekskurso. Ci-tiun fojon la ĉielo ne elpendigis la sunon, sed feliĉe, la grupanoj ne timis la pluvon kaj humorigis la partoprenintoj. — En la du grupkunvenoj S^o Robert Verscheure aŭdigis agrablan paroladeton kaj S^o Bekaert gajan, sed samtempe interesan « vivantan gazeton ». Ankaŭ S^o Faveere donis lernigan lecionon pri la elparolo de la diversaj literoj. — La programo por la venonta monato estas: 1^o Esperanto kroniko de S^o Bruggeman Lucien, 2^o rakonto de S^o Verstraeten Michel, 3^o deviga konversacio inter la gemembroj kaj, 4^o ekskurso al Kortrejko, por viziti la Esperantan Standon en la komerca foiro. — Kiel ĉiu grupo ankaŭ la nia konis malagrablojn: S^o Faveere komunikis al la sekretario ke li ne plu deziras plenumi la prezidantan postenon pro personaj kialoj; tio estas granda bato por nia loka movado, sed nia eks-prezidanto anto promesis tamen ne ĉesi la laboron kaj daŭre gvidi lecionojn en la grupo kaj doni novan kurson (al kiu enskribis jam 10 gelernontoj sed aliaj sekvos en la dua leciono per intenco

propagando). — Ĉar neniu membro volis plenumi la postenon, tial ni decidis elekti estraron (aŭ komitaton) kiu anstataŭos la prezidanton, do la Viŝta Grupo Esperantista « LA FRATECO » estas la unua respublika grupo en Flandra Ligo.

ZWEVEGEM. « *PACO PER ESPERANTO* ».

Jam du monatojn nia grupo fondiĝis. Ni komencis kun 28 anoj. Certe nia grupo prosperas. Ok novaj aliĝis kaj sekvas la lecionojn redonataj per Sro. Libbrecht.

Okaze de la sesa komerca foiro en Kortryk ni aranĝos viziton al ĝi.

Ne forgesu partopreni al niaj dusemajnaj kunvenoj, kaj ĉiu faru sian eblon por agrabligi ilin.

Angulo de la Sercemuloj

Solvo de problemo 26 :

HOR. : Aglo — aort — eraro — aster — ra — dramo — ke — abi — flu — atm — ale — pra — ovo — boa — avo — FS — vigla — of — ekzil — trajt — rigl — troa.


VERT. : Aera — ofer — Grabovski — la — ilo — zg — ord — vil — orf — bil — allog — amu — alt — aso — art — ot — ara — ar — rektavojo — trem ofta.

Solvo de problemo 27 :

La knabeto ne ankoraŭ bone kalkulis.

Premioj. Gajnis premion por problemoj 26 kaj 27 : Fino Keveryn kaj Sro Oss.

Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. 8/10 aja de la poentoj donas partoprenrajton. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Septembro 1937 rekte al Sro F. VOLDERS, Bredastraat 94, Antwerpen. La difinoj kun (R) estas radikvortoj.



MURFASADO. Probl. 30

(13 poentoj)

- 1) Sonanto.
- 2) Denove (R).
- 3) Prepozicio.
- 4) Kapti ion mane (R).
- 5) Tute certa, tute deviga.
- 6) Kaptado (R).
- 7) Senkulpige.
- 8) Sin vidigado (R).
- 9) Solena armea revuo (R).
- 10) Duobla.
- 11) Papago (R).
- 12) Kolekto (R).
- 13) Sonanto.

Komencu per unu litero, kaj aldonu unu por ĉia nova vorto gis la sepa, tiam denove forprenu unu literon.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	29,—	bind
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Si — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallietier — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Stranga Butiko. — R. Schwartz	10,—	»
Maria kaj la Grupo. (L.M.-Libro)	22,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Muusses E-Biblioteko (10 volumetoj)	41,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterrijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Beknopt Woordenboek Van Straaten	40,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,—	»
INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.		
Verda stelo, sur blanka fono: 3.— fr.		
Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.		
Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.		
Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.		
Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.		
Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.		

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

Sano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

★ Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT


Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

« Presejo Groote Centrale Drukkerijen », Lange Loza nastrat, 181, Antwerpen.

“BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brusel

Lekkere Drinken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

mangajoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo.

ST MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

Grand Hotel de la Chapelle

lokita en arbarĉirkaŭaĵo ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo laŭteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensiono

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES